SOCIAJ RILATOJ

- Mallerta interpersona komunikado (aŭ almenaŭ problemoj en komunikado kun aliuloj)
- Problemoj de sociaj rilatoj, malĝusta komunikado kaj rigideco.
- Malkapableco kompreni sociajn rilatojn (situaciojn)
- Objektoj povas doni pli da ĝojo ol personoj
- Ne estas babilemaj
- Tre postulema
- Perturboj de aŭtoagreso
- Ne rekonas danĝerecon de la situacio
- Neflekseblaj rutinoj kaj obstino kiam iu volas ŝanĝi ilin
- Ne scipovas ludi rolludon
- Miskompreno de vivmanieroj
- Malfacile edukeblaj

KORPO

- Faras ritmajn korpomoviĝojn
- Manko de okulkontakto (ne ĉiam !)
- Povas aperi epilepsion (ĉe pli malpli 25%)
- Problemoj de dormado, manĝado kaj fobioj
- Junaj infanoj ofte gapas al rotaciantaj objektoj
- Povas bati sin mem
- Stereotipaj movoj (ekz. lulado, promenado tra la sama vojo)
- Selektiva manĝado

Kaŭzoj

Estas multdiversaj kaŭzoj de aŭtismo.

- Aŭtismo probable havas genetikajn kaŭzojn (multigenajn kaŭzojn)
- La kaŭzo de Milena: kiam Ania estis graveda en la dua monato, nia pli maljuna filo

Wiktor malsanis rozeolon/rubeolon en antaŭlernejo. Ni tuj iris al kuracistoj pro Ania gravedo, sed kuracistoj opiniis, ke la bebo/feto ne estas en danĝero, ĉar Ania kiel

infano malsanis rozeolon (poste ni eksciis, ke tio estis malĝusta diagnozo).

- Ju pli maljunaj gepatroj, des pli kreskas risko de aŭtismo ĉe bebo. La risko de la naskiĝado de aŭtisma bebo kreskas je 18% kun la kreskado je 5 jaroj de la aĝo de a patrino aŭ 10 jaroj de la aĝo de patro.
- Anti-depresantoj kaj anti-epileptikoj prenitaj dum gravedeco povas kaŭzi aŭtisman

Diagnozo

- Oni ofte diagnozigas aŭtisman ĉirkaŭ la du-kaj-duona aĝo (ĉe Milena en la tria aĝo)
- Kutime la infano perdas iujn kapablojn, kiuj aperis antaŭe (Milena ĉesis paroli en la 3a jaraĝo)

Kiel « venki » aŭtisman aŭ instrui aŭtisman infanon

- Ne eblas entute »venki«
- per pacienca kaj longdaŭra klopodado de gepatroj, terapistoj aŭ (en la kaŭzo de la milda sindromo de Asperger) de si mem
- Oni povas instrui al aŭtismulo kelkajn sociajn aferojn (ekz. Milena eklernis atendi en restoracio)
- Oni devas klarigi al ili, kiel lavi sin, ordiĝi, purigi dentojn ktp., multfoje ripetante
- Sensora integracio

Tipoj de aŭtismo

- Estas tre diversaj, variaj tipoj de aŭtismo, do pro tio oni diras pri la **aŭtisma spektro**
- Ne ĉiu aŭtismulo havas similajn simptomojn
- Ne eblas priskribi ĉiujn aŭtismulojn laŭ iu ajn ŝablono
- **La sindromo de Asperger** (pli milda formo de aŭtismo, sed malfacile rekonebla; inteligenteco normala aŭ tre bona; eksterordinara kapablo pri iu temo/ekinteresiĝo)
- **Altfunkcia aŭtismo** (ang. high-functioning autism)
- **La sindromo de Kanner** (klasika aŭtismo, t.n. infaneta aŭtismo)
- **Neparolanta aŭtismo** (kunigita kun mutismo aŭ tn. “selektanta mutismo”)

Mitoj pri aŭtismo (i.e.. malveraj)

- Ĉiuj aŭtismuloj ne povas vivi memstare, do ili bezonas iun, kiu devas helpi al ili
- Aŭtismo aperas en la familio kun neamanta patrino (totala absurdaĵo!). Certe la malnova teorio de frida patrino estas malvera
- Aŭtismo aperis pro la problemoj de la mamnutrado (en familioj, kie patrinoj ne mamnutris bebon).
- La vakcinoj kontraŭ morbilo (aŭ aliaj) kaŭzas aŭtisman
- Aŭtismuloj kun sciegula simptomaro (fr. Savant sindromo)

- Profundaj interesiĝoj pri iu temo, arto, objektoj ktp.
- Enfokusigo pri tre mallarĝa temo (ekz. kalkulado, pentrado)
- Havas superaveraĝan inteligentecon

Famaj aŭtismaj homoj

Certaj

- **Temple Grandin** (doktorino de bestoscienco de Colorado State University; la aŭtorino de multajn librojn pri aŭtismo)
- **Kim Peek** (la modelo de la heroo [ĉefrolulo] de Rain Man)
- **Daniel Tammet** (brita poligloto kaj matematikisto; konas pli ol 20 lingvoj, i.a.

Esperanto)

- **Greta Thunberg** (la sveda media aktivistino kontraŭ klimato-varmiĝo)

Famuloj kun certaj trajtoj de aŭtismo

- **Isaac Newton**
- **Hans Christian Andersen**
- **Thomas Alva Edison**
- **Charlie Chaplin**
- **Albert Einstein**
- **Bill Gates**

Filmoj kun autismuloj

- *Rain Man* (de Barry Levinson)
- *Mozart and the Whale* [kaj baleno] (de Peter Noess)
- *Temple Grandin* (de Mick Jackson)

La 2-a de aprilo estas internacia tago de aŭtismo

Jozef Czescik

Sumoo legado.

Internacia Esperanto-Sumoo Septembre 2024 estis la 15a datreveno de la Internacia Esperanto-Sumoo, kiu komenciĝis septembre 2009, kaj en novembro 2024 okazis la 90a Sumoo. Sinjoro HORI Jasuo klarigas al ni.

Kio estas sumoo ?

Certe multaj ankoraŭ ne scias, kio estas la Sumoo, kiu ne estas Esperanto-vorto. Tamen mi esperas, ke en Esperantujo la vorto « Ssumoo » estas relative



Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint
Provlegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@protonmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

bone kontata, ĉar jam 15 jaroj pasis, ekde kiam mi komencis okazigi la Internacian Esperanto-Sumo-on. Sumo-o estas la nomo de unu el la japanaj tradiciaj lukto-arto. Vidu la dekstran foton. Du luktistoj luktas.

Kiam unu luktisto faligas aŭ puŝas eksteren la alian luktiston, li venkas. La turneo okazas 6 fojojn jare po 15 tagoj, nome en januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Sumo-o estas ŝatata de multaj japanoj, do multaj vidas ĝian televidelsendon posttagmeze.

Mi hontis pro tio, ke mi ne legis Esperanto-librojn.

Kia rilato estas inter tiu Sumo-o kaj Esperanto- Sumo-o? Mi klarigos. Mi estas longjara esperantisto, sed antaŭ ol mi komencis organizi tiun Esperanto-Sumo-on, mi ĉiam hontis pro mia maldiligenteco pri legado de Esperanto-libroj. Tiun tempon mi estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto, kaj kiam okazis estrarana kunsido en ĝia oficejo en Tokio, mi ĉiam aĉetis plurajn Esperanto-librojn, kaj en la trajno mi malfermis la librojn kaj komencis legi ilin, sed mi tuj endormiĝis. Post kiam mi revenis hejmen, tiuj libroj tuj kuŝis kaj endormiĝis en mia libroŝranko, kaj neniam vekigis. Mi tre hontis pro tio. Mi sciis, ke samo okazas al multaj esperantistoj. Se ni ne legas librojn, nia Esperanto-kapablo neniam altiĝas kaj la Esperanto-librokulturo velkas, nome nia senlegado signifas velkadon de Esperanto. Tamen kiamaniere ni povos instigi min kaj esperantistojn legi librojn? Ĉu mi simple havigu al mi kaj al ili celon, ekzemple « legi 500 paĝojn dum unu jaro »? Iuj veteranaj 1 esperantistoj provos legi tiom da kvanto, sed komencantaj esperantistoj neniam volas, nek provas. Kiamaniere mi povos instigi eĉ komencantojn legi librojn?

Mi rememoris iun instruiston de la angla lingvo


Tiam mi rememoris iun instruiston de la angla lingvo en mezlernejo, kiu havigis al siaj lernantoj memdeciditan celon en la ekzameneto de anglaj vortoj, nome malsaĝaj lernantoj rajtis havi celon de eĉ 1 poento el 10 poentoj, male saĝaj lernantoj kuraĝe rajtis havi celon de 10 poentoj. En ekzameneto, kiam tiuj malsaĝuloj gajnis unu poenton, ili ricevis unu venkon, ĉar ilia celo estis 1 poento, male kiam tiuj saĝuloj gajnis eĉ 9 poentojn, ili ricevis malvenkon, ĉar ilia celo estis 10 poentoj. Kutime malsaĝuloj neniam povas venki saĝulojn en ekzamenoj, sed en tiu sistemo eĉ malsaĝuloj povis venki saĝulojn. Sciante tion, tiuj malsaĝaj lernantoj komencis serioze prepari sin por ekzamenetoj. Tiu instruisto nomis tiun ekzamenetaron « Sumo-o de la anglalingva ekzameneto », kaj tiutempa sumoisto Koniŝiki el Havajo sendis gratulmesaĝojn al la instruisto kaj liaj lernantoj. Tion li raportis en la kunsido antaŭ 40 jaroj, kaj mi rememoris tion. Tiu sistemo estis tre bona, egaligante ĉiujn. Kiam ili, ĉu malsaĝuloj kun malaltnivela celo aŭ ĉu saĝuloj kun altnivela celo, atingas sian celon, ili egale gajnas unu venkon. Plenumi la celon memdeciditan, ne truditan de alia homo, estas la plej grave. Rememorinte la manieron de tiu instruisto, mi enkondukis ĝin en Esperanto-Sumo-on.

Kio estas la sistemo en Esperanto- Sumo-o?

Partoprenantoj anoncas, ke ili legos iun libron dum la 15-taga Sumo-o-periodo, ekzemple, « Raportoj el Japanio 27, 3 paĝojn aŭ pli ĉiun tagon ». Veteranoj rajtas elekti malfacilan filozofian libron kun la promeso de 20 paĝoj kaj komencantoj rajtas elekti infanlibron kun la promeso de 1 paĝo. Kiam ili plenumas sian promeson en unu tago, ili gajnas unu venkon. Ambaŭ legantoj de filozofia libro kaj tiuj de infanlibro egale ricevas unu venkon, kiam ili plenumas sian promeson. Tiamaniere veteranoj kaj komencantoj povas lukti en la sama « ringo », kaj kiam ili venkas 15 tagojn, ili ricevas diplomon fine de la Sumo-o-periodo. En tiu Sumo-o eĉ komencantoj povas venki veteranojn, do ili povas ĝoje partopreni.

Kiel Sumo-o komenciĝis kaj kio estas ĝia nuna stato?

Mi prove komencis okazigi Sumo-on septembre 2009 nur al japanoj. Komence partoprenis nur 10. Post du Sumo-oj, mi havis memfidon pri la sukceso, kaj malfermis 2 Sumo-on al la mondo. Kaj poste pli kaj pli multiĝis partoprenantoj. Vi povas vidi la diagramon sube:




La pinto estis en julio 2017, antaŭ la Seula UK. La nombro kreskis preskaŭ ĝis 400, danke al multaj partoprenantoj el Koreio, sed poste koreoj perdis entuziasmon kaj multaj ĉesis partopreni en ĝi, do nun la nombro vagadas je malpli ol 300 el iom pli ol 35 landoj. Konstante la plej multe partoprenas el Japanio, ĉirkaŭ 65, kaj Francio okupis la duan lokon, kaj sekvante ilin Ĉinio, Brazilo, Pollando, Germanio, Italio, Rusio, Britio, kaj lastatempe denove Koreio ktp. Unu fojon multaj partoprenis el Afriko, sed nun malmulte pro la ekonomia kaj politika problemoj, kaj la plej bedaŭrinde el Oceanio preskaŭ neniu partoprenas. Resume el Azio plej multe partoprenas. S-ro Renato Corsetti ofte diras, ke venos tempo, kiam Azio estos la centro de Esperanto-movado. Li povas esti prava, sed mi timas, ke la japana movado maljuniĝis kaj en estonteco ne povos esti tiel multaj partoprenantoj el Japanio kiel nun.

Kiel mi administras la Sumo-on?

Estas ne eble kaj ne bone, ke nur mi administras Sumo-on. Nun mi havas pli ol 10 kunlaborantojn el diversaj landoj, kiuj arde subtenas Sumo-on. Ili respondecas pri 25 partoprenantoj, ricevante iliajn rezultojn ĉiun 5an tagon de Sumo-o-konkurso kaj resendas al ili kuraĝigajn vortojn. Unu polino prizorgas nian retejon (<http://www.esperanto-sumoo.pl/>) kaj ankaŭ faras belan diplomon por perfektaj 3 venkintoj. Ricevi tiun diplomon kun ĉiam malsamaj desegnaĵoj el talentaj partoprenantoj estas plezuro por multaj. Unu francino respondecas pri korektado de recenzoj senditaj de la partoprenantoj.

Unu polo respondecas pri nove lanĉita Koresponda Servo inter sumoistoj. Tiuj rezultoj kaj recenzoj aperas en nia retejo. Antaŭ la komenciĝo de la nova periodo de Sumo-o, mi faras liston de partoprenantoj laŭ la antaŭa rezulto. Perfektaj venkintoj kun 15 venkoj apartenas al la rango A, kaj tiuj, kiuj havis eĉ unu malvenkon aŭ ne partoprenis en la antaŭa Sumo-o apartenas al la rango B, la revenintoj, al la rango C, kaj la novuloj, al la rango D. Partoprenantoj ĝis la numero 150 en la rango A preskaŭ neniam malvenkas. Dum la Sumo-o-konkurso, ili vivas kun ĝi, neniam lasante sian libron el siaj manoj. Kiam mi ordigas la rezultojn kaj la liston, mi forte sentas ilian amon al Esperanto kaj daŭran progreson de Esperanto.



Sumoo multe kontribuas al la movado

Libroj longe kuŝantaj en ŝranko vekiĝis. Multaj partoprenantoj jam finlegis tiujn dormintajn librojn kaj aĉetas la novajn. Laŭ statistiko, unu partoprenanto legas meznombre 60 paĝojn dum unu Sumo-o-konkurso. Dum 15 jaroj ekde septembro 2009 ĝis septembro 2024 okazis 89 Sumoo-oj, kaj entute estis 20 136 partoprenoj (la nombro de la partoprenintoj eble estis 1200), do la legitaj paĝoj estas $60 \times 20\,136 = 1\,208\,160$ paĝoj (11 276 libroj kun 100 paĝoj). Mi estas verkisto kaj eldonisto. Se esperantistoj ne legas miajn librojn, mia verkista kaj eldonista laboro estas tute senutila. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj verkistoj ĝojas pro Sumo-o. Anna Lowenstein, Trevor Steele kaj Julian Modest estas tre ŝatataj verkistoj. Anna estas jam longe fervora partoprenanto. Mi ne forgesu ankaŭ kreskon de solidara sento inter la partoprenantoj. Dum la Sumo-o-konkurso, la partoprenantoj rete babilas kun sia eksterlanda prizorganto, parolante pri la vetero, floroj en ĝardeno, familio ktp, sendante sian rezulton ĉiun 5an tagon. Tio estas tre interesa kaj instiga sperto por ambaŭ, tial la kunlaborantoj tre ĝoje laboras por la Sumo-o. La partoprenantoj ĉiam sentas, ke en la sama momento centoj da esperantistoj 4 same diligente legas, plenumonte sian celon. Tio kreas solidaran kaj amikan senton inter ili.

Sumo-o estas grava mond-ŝanĝilo

Por esperantistoj estu devo kaj ĝojo legi Esperanto-librojn. Sen legado via kapablo neniam altiĝas, nek povas vere ĝui Esperanton. Sen aĉeto de Esperanto-libroj Esperanto kulturo velkas kaj fine malaperos. Dum mi faras liston de partoprenantoj kaj vidas, kiujn librojn ili legas, mi ĉiam miras. El 300 partoprenantoj 270 homoj legas malsamajn librojn. Tio signifas, ke en la Esperantujo ekzistas abundegaj libroj, kiujn niaj antaŭuloj verkis kaj eldonis en la pasintaj 150 jaroj. Tio estas gravega kultura heredaĵo de Esperanto. Se ni ne tuŝus tiun abundecon, ĉu ni povus nomi nin esperantistoj? Tamen konstante legi Esperanto-librojn estas malfacile, ĉar Esperanto estas “eksterlanda” lingvo kaj ni devas lerni ĝin. Homoj estas esence maldiligentaj, do ili ĉiam preparas pretekston por eviti legadon, ekzemple, okupiteco. Tamen pro okupiteco, ĉu ni rajtas ne legi Esperanto-librojn kiel sinceraj esperantistoj? Tute ne. Esperantistoj estas mond-ŝanĝantoj. Kial ni elektis Esperanton, ne la anglan? Certe ni estis impresitaj de Homaranismo de d-ro Zamenhof. Ĉu ni ne komencis lerni Esperanton por efektiviĝi tian mondon, kie homoj vivas paco, egale kaj feliĉe? Ne forgesu nian gravan motivon komenci lerni Esperanton. Sumo-o estas kreita por okupitaj sed maldiligentaj homoj kiel ni. Partoprenante en Sumo-on, ni ŝanĝu nian vivmanieron, la Esperanto-movadon kaj celu ŝanĝi la mondon. Sumo-o estas la plej granda leg-movado en la historio de la homaro, danke al interreto kaj danke al Esperanto. Ĝi havas gravegan historian mision por ŝanĝi la mondon pli pacen kaj pli egalen. Partoprenante en ĝi, ni povas dediĉi nin al tiu sankta misio. Sumo-o ne estas simpla leg-konkurso, sed grava mond-ŝanĝilo.

Miaj personaj rememoroj pri Sumoo

Multajn jarojn mi prizorgis Sumo-on, dume mi havas multajn neforgesebkajn rememorojn.

1. Subite malaperinta prizorganto En la komencaj kelkaj jaroj iu viro en Serbio kunlaboris. Li ne skribis al mi multe, sed diligente plenumis sian laboron, sed iun tempon li ĉesis sendi mesaĝon al mi. Mi timis, ke li malsaniĝis aŭ plej malfeliĉe li mortis. Mi sendis al serbaj partoprenantoj pri 5 li, sed neniun konis lin. Mi havis neniun rimedon trovi lin, do mi rezignis serĉi lin. Mi ne memoras, kiel li kontaktis min. Certe li estis soleca esperantisto, tamen ĝuis labori por Sumo-o.

2. Malsaniĝo estas la plej granda malhelpilo Kio malhelpas partoprenon al Sumo-o, tio estas malsaniĝo. Iu japanino estis fervora esperantistino kaj partoprenadis en Sumo-o. Sed ŝi eksuferis pro kancero. Fojfoje ŝi enhospitaliĝis kaj kuraciĝis. Ĉiam ŝi diligente legis kaj ĉiam gajnis 15 venkojn, sed post la suferigo pro kancero, ŝia rezulto ne estis stabila. Kiam ŝi sendis al mi malvenkojn, mi timis, ke ŝi denove malsaniĝis. Tia stato daŭris kelkajn Sumo-o-konkurosojn, kaj fine ŝi ne partoprenis kaj poste mortis. Kiam komenciĝas Sumo-o, mi ĉiam rememoras ŝin. Malsaniĝo estas la plej granda malhelpo por Sumo-o, do mi kaj vi prizorgu min kaj vin por ke ni povu longe partopreni en Sumo-o.

3. Ploreanta knabineto Gelernantoj de La Chaux-de-Fonds, Svislando, partoprenadis, prizorgate de instruistino sino Monika Molnar. En la komencaj jaroj iu knabineto, eble 8-jara, revenis hejmen por feriado, sed ŝi rimarkis, ke ŝi forgesis la libron en la lernejo. Ŝi panikiĝis kaj ploregis. Ŝia patrino surprizite tuj telefonis al Monika, kiu tuj

sendis la kopion de la paĝoj fakse al la patrino. Kiel la knabino trankviliĝis kaj dankante legis la kopion! Certe tiu okazaĵo restos ankoraŭ nun en ŝia koro kaj kuraĝigas ŝin. Mi supozas, ke partopreno en Sumo-o donas al la gelernantoj bonan edukon, ĉar ili mem decidas sian celon kaj plemumadas ĝin, disciplinante sin. La sistemo de Sumo-o povas esti tre utila ne nur en edukado, sed ankaŭ en aliaj kampoj. Kompare kun tiu knabino, multaj plenkreskaj Sumo-istoj facile rompas al si faritan promeson. Mi ne povas detale scii, kio igas ilin rompi la promeson, sed per iliaj malvenkoj mi povas vidi ilian karakteron kaj vivmanieron.

4. Mi povis legi 50 librojn el PVZ Japano Ito Kanĵi komplis Plenan Verkaron de L.L.Zamenhof, kiu konsistas el pli ol 50 dikaj libroj. Mi aĉetis ĝin kontraŭ multege da mono kiel devo, ĉar mi estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto. Tamen la libroj longe kuŝis en mia ĉambro, neniam tuŝite. Kiam mi komencis Sumo-on, mi decidis legi ĉiujn, kaj post kelkaj jaroj mi sukcesis je tio. Sen Sumo-o mi neniam legus ilin. Mi fieras, ke eble nur Ito kaj mi legis ĉiujn librojn. Danke al Sumo-o mi sentas, ke mi fariĝis vera esperantisto.

5. Prizorgantoj havas profitojn 6 7 Mi prizorgadas Sumo-on dum 15 jaroj. Por tio mi devas labori multe, uzante mian tempon kaj energion, sed pli ol tiuj malfaciloj, mi ricevas pli grandajn profitojn, kompreneble ne financajn. Mi havas multajn konatojn en la mondo. Ĝis nun ebl 1200 homoj partoprenis en la 90 Sumo-oj. Tiuj homoj sendis sian aliĝon rete al mi, do mi havas tiom da retadreso. Ili estas mia trezoro.

En Sumo-o ĉirkaŭ 200 homoj estas konstantaj partoprenantoj tre fidelaj, kun kiuj mi povas ricevi kaj sendi diversajn informojn. Esperanto estas tre utila en kolektado de informoj. Ekzemple, post la ukraina milito mi kolektas opiniojn pri ĝi. Ĉar mi havas multajn retadresojn kaj certe mia retadreso troviĝas ankaŭ ĉe ili, venas multaj informoj. Dum tiuj du jaroj mi kolektadas kaj dissendadas informojn el la mondo al 300 Sumo-istoj. Ja mi havas 2000 retadresojn, sed sendi al ĉiuj estas tro da ĝenoj, do mi dissendas nur al Sumo-istoj, ĉar ili ŝatas legi kaj estas fidindaj. Sen Sumo-o, mi ne povus konatiĝi kun tiom da sinceraj esperantistoj kaj ne povus fari diversajn agadojn, kiujn mi nun faras per Esperanto. Sen Esperanto-Sumo-o, mi ne povus havi tiun ĉi riĉan vivon. Mi vere dankas al Sumo-o, mia genia inventaĵo.

Mi estas la plej granda profitanto, sed ankaŭ aliaj prizorgantoj ĝoje laboras por Sumo-o, ĉar ĝi donas al ili diversajn profitojn. Certe ili havas sian rakonton pri Sumo-o.

Plano de la Sumo-o en 2025 kaj 2026:

La 91a Sumo-o: la 12a de januaro - la 26a de januaro

La 92a Sumo-o: la 9a de marto - la 23a de marto

La 93a Sumo-o: la 11a de majo - la 25a de majo

La 94a Sumo-o: la 13a de julio - la 27a de julio

La 95a Sumo-o: la 14a de septembro - la 28a de septembro

La 96a Sumo-o o: la 9a de novembro - la 23a de novembro

La 97a Sumo-o: januaro

La 98a Sumo-o: marto

La 99a Sumo-o: majo

La 100a Sumo-o: julio

Aliĝmaniero: Sendu vian datumon al Hori Jasuo laŭ la suba ekzemplo: Horizonte (s-ro HORI Jasuo, Maebaŝi, Gunma, Japanio, hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp) ,,

For la batalilojn!“ verkita de Bertha von Suttner. Ĉiutage 10 paĝoj.

Pli da informo : Vizitu nian retejon: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Vojaĝo

Saluton, samideanoj vojaĝemuloj!

Mi volas kunhavigi al vi mian sperton pri la monda reto de gastigado, precipe tiuj, kiuj ligas nin per la internacia lingvo Esperanto. Mi proponas diskonigi al vi mian opinion pri kelkaj mondaj retoj de gastigado. 🌐

Dum jardekoj, mi vojaĝis per aŭto tra Eŭropo kaj trans ĝiaj limoj, por ke miaj infanoj malkovru aliajn landojn. 🚗

Miaj Esperantistaj vojaĝoj komenciĝis kun mia familio, kun bebo. Poste, mi vojaĝis sola kun mia violono, 🎻 per aviadiloj kaj trajnoj. ✈️ 🚆 🚊

Fine, mi restis en Bretonujo, veturante per adaptita veturilo: elektra kuŝtricklo kun sunpaneloj. Eĉ pli ekologie! 🌱 🐞

Jen, unue, retoj nur por Esperantistoj! 📋 ❤️ 🌐

Pasporta Servo 📖 🏠

Pasporta Servo estas la plej konata reto por Esperantistoj, kaj mi uzis ĝin dum pli ol 30 jaroj. Laŭdire, ĝin kreis Jeanne-Marie Cash, de Tuluzo, kun alia japana studentino en 1974. Cetere, antaŭ tridek jaroj, ekzistis ankaŭ la librolisto de la Amikeca Reto, de la pacisma movado. 📄 🌱

Danke al la Pasporta Servo, ni neniam devis tranokti en hotelo aŭ tendumi. Miaj infanoj ĉiam trovis amikojn kaj ludilojn, kaj somere, la bebo havas malvarmetan ĉambron por dormi. Ni ĉiam havis komplezajn privatajn ĉiĉeronojn kaj trejnadon por korekti nian francan akĉenton! 🌐 🧑 🧒

La reto evoluis de paperaj adresaroj al reta platformo, kaj nun oni povas ĝin kunporti en la poŝo, en sia telefono. Sed mi memoras la epokon antaŭ la poŝtelefonoj, kiam korespondado postulis paciencon. Iam, letero de la Alpoj, kie mi loĝis, flugante al Ĉeĥoslovakio, trapasis Portugalon! 📧 🇵🇹

Estas konsilinde kontakti plurajn gastigantojn samtempe. Pasporta Servo ne estas formala asocio, do la listo ne estas ĉiujare ĝisdatigata. Eblas ankaŭ kontakti lokajn klubojn aŭ serĉi en sociaj retoj, kie membroj ofte organizas kunvenojn aŭ kunveturadojn (karavanojn) al eventoj. 🗺️ 📅

Se vi volas renkonti homojn, kiuj kredas je la ideo de mondfrateco, Pasporta Servo estas la plej bona elekto. Krei konton estas simpla, kaj se vi detale plenigas vian profilon per detaloj pri viaj intereso, via hejmo, kaj viaj preferoj por gastigado, vi certe ricevos pli da petoj. 🏠 👤 📞

Ĉefe: sen la Pasporta Servo, mi ne sukcesus esperantistigi mian edzon kaj miajn tri gefilojn. Ni ankaŭ ĉiam lasis la ŝlosilon al eksterlandanoj, kiuj parolas Esperanton, ĉar oni devas esti iom idealisma por kredi je frateco inter homoj! Mi povas diri, ke danke al niaj vizitantoj el la tuta mondo, foje el kvar diversaj naciecoj en nia domo, mia edzo kaj miaj tri infanoj vere progresis en Esperanto. Hodiaŭ, Pasporta Servo riĉiĝis per Telegrama grupo.

👉 [Pasporta Servo] (<https://www.pasportaservo.org>)

Amikumu 🌐 🏠

Amikumu estas moderna programeto (nur apo) por lingvemuloj. Ĝi proponas pli ol 7 000 lingvojn, kaj regionajn kaj artefaritajn. Kreita de Esperantistoj, ĝi ebligas al vi trovi homojn, kiuj parolas la saman lingvon aŭ interesiĝas pri lingvolernado. Per ĝi, vi povas trovi homojn proksime al vi aŭ dum viaj veturadoj laŭ via itinero. Tre praktika por la kafaŭzo ĉiujn du horojn! 📖 👥 ☕

Mi uzis Amikumu en Parizo, kiam mia Flixbus paneis, survoje al NR, kaj mi manĝis kun la prezidanto de Espéranto-France. Ankaŭ en Svislando, juna 16-jaraĝa Esperantistino invitis min tranokti en sia hejmo, kie mi renkontis ŝiajn gepatrojn, kiuj ĵus revenis de plurjara vojaĝo en Suda Ameriko. La aplikaĵo estas senpaga, kaj kvankam la komunumo estas malgranda en kelkaj landoj (ekz. Makedonujo), ĝi estas bonega ilo por trovi samideanojn aŭ skribi en tokipono. 📧 🏠

👉 [Amikumu] (<https://www.amikumu.com>)

Esperantujo estas ne nur diasporo, sed socia reto en si mem. Do, ne hezitu prepari vian vojaĝon longe antaŭe traserĉante homojn en:

- **Lokaj kluboj** 📞
- **Jarlibroj de UEA kaj de SAT** 🌐 🕒
- **Membrolistoj de Esperantaj fakasocioj** 📄 📋 Ekz. TEVA (vegetaranoj)
- **Kaj ĉefe, vizitu viajn novajn amikojn renkontitajn en la pasintaj Esperanto-renkontiĝoj!** ❤️

Jen, due, retoj por varbi simpatiantojn por Esperanto! 📊 ❤️ 🌐

Servas 📖 🏠

Servas estas unu el la plej malnovaj retoj de gastigado, kun forta fokuso sur paco kaj interkultura kompreno. Mi malkovris Servas dum vojaĝo tra norda Italio, kiam mia 14-jara filo volis praktiki la italan lingvon. Li plendis, ke ni ĉiam haltis ĉe esperantistoj, dum li volis praktiki sian italan. Mi nun denove membras en ĝi kaj ĵus trovis bretonan entuziasman freŝbakitan esperantistinon tie! La reto ofertas filtritan aliron, kio garantias kvaliton de la gastigo, kaj la ĉiujara kotizo certigas la aktualecon de la kontakto. 🇮🇹 🧑🏫 Tutmonda regulo postulas, ke la gastoj dormu du noktojn, por ĝui tutan komunan tagon kun siaj gastigantoj, kaj ne trakti ilin kiel senpagan hotelon. Same kiel UEA, Servas estas NRO en rilato kun Unesko.

Kiel Esperantisto, mi ŝatas, ke la vorto "Servas" signifas "mi servas" en Esperanto. Tio montras la spiriton de donado kaj interŝanĝo, kiu estas la koro de ĉi tiu reto. Se vi volas vojaĝi por renkonti homojn kaj ne nur por vidi lokojn, Servas estas perfekta elekto. 🏠 👥

👉 [Servas](<https://www.servas.org>)

CouchSurfing , 📖 🏠 👥

Preskaŭ 30 jarojn post la Pasporta Servo naskiĝis CouchSurfing. Ĝi fariĝis tre populara kaj ankaŭ mi uzis ĝin, poste forlasis ĝin pro ĝia kreskanta komerciĝo kaj la enkonduko de deviga pag-sistemo. Mi tiam preferis turni sin al pli komunumaj alternativoj, kiuj respektas la valorojn de interŝanĝo kaj solidareco, kiel BeWelcome, kiu havas grupojn, forumon, kaj kiu ankaŭ ofertas interfacon en Esperanto!

👉 [CouchSurfing] (<https://www.couchsurfing.com>)

Alternativaj Retoj de Gastigado 🏠🌐

BeWelcome 🌐👉 Ĝi estas virtuala komunumo. BeWelcome estas senpaga kaj libera platformo, kreita de volontuloj. Ĝi ofertas multlingvan interfacon (inkluzive de Esperanto) kaj estas bonega alternativo al komercaj retoj. La komunumo estas juna kaj malfermita al la spirito de interŝanĝo. Mi tre ŝatas. 🏠👥

👉 [BeWelcome] (<https://www.bewelcome.org>)

Couchers.org 🏠🌐

Couchers.org estas senprofita reto, kreita kiel respondo al la komercigo de aliaj platformoj. Kvankam ĝi estas nur en la angla lingvo, mi esperas, ke ĝi malfermiĝos al la 85 aŭ 90 % de la homaro, kiu ne parolas la anglan. 🏠👥

👉 [Couchers.org] (<https://www.couchers.org>)

Retoj por Biciklantoj 🚲🚲

WarmShowers 🚲👥🏠

WarmShowers estas reto por biciklovojaĝantoj, kie gastigantoj ofertas lokon por dormi kaj varman duŝon. Mi uzis ĝin por vojaĝoj en Bretonio, kaj la spertoj estis ĉiam pozitivaj. La regulo estas pasigi nur unu nokton. 🚲🏠

👉 [WarmShowers] (<https://www.warmshowers.org>)

DodoCyclo 🚲🏠

Por tiuj, kiuj preferas senregulan alternativon, DodoCyclo estas Facebook-grupo dediĉita al bicikloturistoj, kun simpla tabelo listiganta la adresojn. Tute senpaga (en FB, vi estas la produkto), ĉi tiu reto kontribuas duone kun WS por miaj vizitantoj sur du, tri aŭ kvar radoj (jes ja, kuŝanta tandem kun kvar radoj kaj sunpaneloj sur la tuta longo!). La sola malavantaĝo, kaj grava: mi nun bojkotas Fejsbukon, mi forlasis ĝin pro etikaj kialoj, kaj mi tute ne plu uzas ĝin. Ĉar mi ne volas instigi vin daŭre uzi Facebook, mi invitas vin uzi la novan retejon de la (kontestata) fondinto de DodoCyclo.

👉 [DodoCyclo] (<https://dodocyclo.fr/>)

Héberge un cyclo

Ankaŭ Héberge un cyclo estas Facebook-grupo, kun la malavantaĝoj, kiuj akompanas tion: privatecaj problemoj kaj manko de dediĉitaj funkcioj. Ĉiuokaze, Facebook estas por mi afero de la pasinteco.

Welcome To My Garden 🌱🏠

Mi ne ŝatis la sintenon de la biciklantoj, kiujn mi gastigis per la pagenda WTMG; ili kondukis kiel klientoj en hotelo kaj poste, ili preferis manĝi solaj en mia garaĝo! Mi tuj retiriĝis el ĉi tiu reto.

👉 [WTMG] (<https://welcometomygarden.org/>)

Cyclo Accueil Cyclo (CAC): Cyclo-Camping International

Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@gmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Iniciato de la asocio Cyclo-Camping International, la CAC proponas reton de gastigado inter membroj de la asocio. Ĉi tie, vi trovos spertajn kaj tre gastamajn bicikloturistojn, kun vera "asocia" etoso! Multaj adresoj en Bretonio.

👉 [Cyclo Accueil Cyclo]

(<https://www.cyclo-camping.international/cac/>)

Sleepy Bike 🚲 🏠

Sleepy Bike estas moderna kaj etika alternativo por biciklovojaĝantoj. La platformo estas malfermitkoda (open source) kaj bazita sur la valoroj de kunlaboro kaj sendependeco. 🚲 🏠

👉 [Sleepy Bike] (<https://sleepy.bike>)

Aŭ, alia solvo, aliĝu al [BEMI](#) kaj kun-karavanu!

Aliaj Gastigaj Retoj 🌍 🧑

Trustroots 🌍 🏠

Trustroots estas platformo por alternativaj vojaĝantoj, kiun emfazas kunvivadon kaj interŝanĝon. Ĝi estas multe uzata de biciklovojaĝantoj kaj homoj, kiuj vivas laŭ kunvivaj valoroj. Mi ankoraŭ ne provis. 🚲 🏠

👉 [Trustroots] (<https://www.trustroots.org>)

NomadSister ♀ 🌍

NomadSister estas reto nur por virinoj, kiuj vojaĝas solaj aŭ kun amikinoj. La spirito de solidareco kaj subteno estas tre forta en ĉi tiu komunumo. Mi jam gastigis dufoje, sed neniam gastis per tiu reto. 🏠

👉 [NomadSister] (<https://www.nomadsister.com>)

Pri alternativaj retoj 😊

Mi ankaŭ estas membro de **La Route des SEL** (Sistemoj de Lokaj Interŝanĝoj), reto bazita sur interŝanĝo de servoj kaj scioj sen mono. Tamen, mi ankoraŭ neniam havis la okazon gastigi iun per ĉi tiu platformo. Kontraste, danke al **La Route des Stages**, mi gastigis nekutiman paron, kiu helpis min en mia ĝardeno, iom simile al WWOOF, kaj lasis nekredeblan memoron pri nia renkontiĝo. La juna viro estis sklavigita en Libio.

👉 [Route des Stages]

(<https://www.route-des-stages.org>)

Tutmonda Reto de Greeters

En grandaj urboj ekzistas tutmonda gastiga reto, kie lokaj studentoj proponas senpage montri sian urbon al vojaĝantoj. Temas do nur pri taga akcepto, kun helpo por trovi hotelon, ekzemple. Mi malkovris ĝin en Sudorienta Azio, kun simpatiaj studentoj pri turismo, kiuj vizitis por la multfoja fojo la Muzeon de Historio de Vjetnamujo en Ho-Ĉi-Min-urbo, nur por la plezuro paroli la francan.

👉 [Réseau Global des Greeters] (<https://internationalgreeter.org/fr>)

SIGHT: Programo de la asocio **MENSA**, por informado, gvidado kaj gastamo al vojaĝantoj.

Kiel membro de Mensa, asocio kuniganta homojn kun alta intelekta kvociento, mi malkovris SIGHT, la gastigan reton dediĉitan al gastamo inter membroj. Mi nature registris mian profilon tie, sed mi devas konstati, ke la agado ŝajnas pli intensa en grandaj urboj. Mi mem ankoraŭ ne havis la okazon akcepti iun. Cetere, mi decidis ne plu flugi, mi volonte evitas grandajn internaciajn metropolojn, preferante esplori per biciklo kaj ĝui la naturon, kiu restas al ni.

👉 [Mensa International] (<https://www.mensa.org/program-sight>)

Konkludo 🏠 🌱

Evoluo de la gastamaj retoj 📄 🖨

Dum la jardekoj, la gastamaj retoj evoluis de paperaj adresaroj al interretaj platformoj, celantaj esti ĝisdataj. Ĉi tiu cifereca transiro alportis novajn defiojn, kiel la administradon de la sekureco de membroj. Tamen, la spirito de fido al nekonatoj kaj kunhelpo pliiĝis. Kunvojaĝado kaj la multiĝo de gastamaj platformoj estas evidentaj ekzemploj de ĉi tiu tendenco. Kontraste, mi bedaŭras, ke **pacismo** estas malmulte konata, kaj la vorto preskaŭ forestas en sociaj retoj.

Kial aliĝi specife al Esperanto-Retoj? 🌍 ❤️

La retoj kiel **Pasporta Servo** (gastigado) kaj **Amikumu** (komunikado per aliaj lingvoj) ne nur faciligas vojaĝadon, sed ankaŭ kreas ligojn inter homoj, kiuj kredas je la povo de lingvoj kaj interkultura kompreno. Se vi volas aliĝi al ĉi tiuj retoj, kreu konton, plenigu vian profilon per detaloj, kaj estu preta akcepti gastojn el la tuta mondo. Kompreneble, se vi ne emas akcepti iun, en ia momento, ne necesas pravigi sin. “Mi nuntempe ne disponeblas, bonan vojaĝon al vi!” sufiĉas. 🌍 👤

Kun Esperanto, vi ne nur lernas lingvon, sed ankaŭ aliĝas al tutmonda komunumo, kiu valorigas pacon, justecon, lingvan diversecon kaj interhomajn rilatojn. Do, kial ne engaĝiĝi pli profunde en tiun direkton? 🌍 ✨



Jen mia violono en Siberio.




Jen mia elektra kuŝtricio kun sunpaneloj.

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro

FESTO

MOISSAC 17-24 AUGŬSTO 2025



organizata de **JEFO**, la Junulara Esperantista Franca Organizo.

[Kio estas FESTO? – FESTO 2025](#)



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Greziljono

Turneo de Jozef Czescik
De la 20a de marto ĝis la 4a de aprilo

Rencontres Espéranto Plouézec

23-24 Août 2025



Esperanto-kongreso 2025
Nantes
De la 7a ĝis la 9a de Junio

<https://kongreso2025.esperanto-france.org/>

PRINTEMPaS :

De la 18a ĝis la 27a de aprilo

intensivaj kursoj por ekzamenoj kun 4
famaj instruistoj

BEMI-semajno

De la 27a de aprilo ĝis la 3a de majo:
biciklaj promenoj kaj ĥora (korusa)
renkonto

Ekskursoj post la kongreso de Espéranto
France:

De la 9a ĝis 12a de junio.

Informoj en

<https://gresillon.org>